

**ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO**

marto 2020



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA
KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ**

Volumo 27[1] numero 138 marto 2020

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktistoj: Terry Manley, Andrew Woods

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa). Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEa: www.esperanto.org.nz / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de majo 2020

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2020 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.
ISSN 2207-0087

Sur la kovrilo

Rekreskado per novaj ŝosoj kaj folioj post arbarfajro
(freeaussiestock.com)

enhavo

- 04 Antaŭparolo
- 05 Montreala kongreso 2020
- 06 Kelkaj anoncoj kaj sciigoj
- 07 Estas ĉiam io nova: poŝtmarkoj
- 08 Helen Keller: lumo en mallumo
- 09 Historia germana influo en Afriko
- 11 George Orwell kaj Esperanto
- 12 Aŭklanda kongreso de januaro:
fotoj kaj komentoj
- 20 La Fluganta Elefanto:
japanaj balon-bomboj
- 26 La Granda Viktoria Biciklado

ANTAŬPAROLO

Mi deziras danki al Heather Heldzinger, Jonathan Cooper, David Ryan, Donald Rogers, Franciska Toubale, Kam Lee, Charles Stevenson, Trevor Steele, Joanne Johns, Katja Steele, Paul Desailly, David Rockell, Indrani Beharry-Lall kaj Roger Springer pro ties kontribuoj en la pasinta jaro. Ankaŭ al Stefan MacGill, Duncan Charters, Szabolcs Szilva kaj Mark Hamme — eksterlandanoj kiuj kontribuis. Sed mi donas specialajn menciojn al Sarah Palmer, Paul Garwood kaj Marumi Smith, kiuj skribis siajn unuajn artikolojn por la gazeto.

Sen ĉi tiuj supraj, la gazeto ne ekzistus. Artikoloj estas diversaj: pri E-eventoj (kongresoj, kursoj, ekskursoj); pri ŝatokupoj; recenzoj; historio ktp. Do ne forgesu leganto, ekskribu!

Mi dankas al niaj fidindaj provlegantoj, Vera Payne kaj Donald Rogers. Tiuj elkribas la mistajpaĵojn, misliterumadon, gramatikajn erarojn kaj nekompreneblaĵojn por prezenti gazeton multe pli bona. Mi dependas de Vera kaj Donald pro ties pli profunda lingvoscio. Foje eraroj evitas tiun kribrilon, sed pri tiuj mi respondecas pro aŭ mistrafo aŭ tempomanko.

Mi fine deziras dankegi al mia kunredaktisto, Joanne Johns, kiu redaktas ESK-on de Septembro 2014 ĝis Decembro 2019 (numero 116 ĝis numero 137). Joanne ĉiam prezentas buntan, klaraspektan gazeton kaj estas plezure trarigardi kaj legi ĝin. Joanne ne nur aranĝis la gazeton tiel sed ofte kontribuis du aŭ tri artikolojn por plenigi ĝin. Do multajn dankojn Joanne.

En 2020 Andrew Woods el Adelajdo alprenos la laboron de Joanne kaj mi antaŭĝuas kunlaboradon kun li.

TERRY MANLEY

Preparu vin por la Montreala Kongreso!

David Ryan (Wellington)



La ĉi-jara Universala Kongreso okazos en Montrealo, Kanado, en aŭgusto. Mi jam vizitis Montrealon kelkfoje kaj mi trovas ĝin tre bela kaj vizitinda urbo kun riĉa, interesa historio.

Montrealo estas la plej granda urbo en la provinco Kebekio en orienta Kanado, kaj ĉefe franclingva urbo. Certe la franca kiun oni parolas en Kanado ne estas tute simila al tiu parolata en Francio. La akĉento estas malsama kaj oni uzas kelkajn vortojn nekonatajn al francoj — fakte, oni uzas malpli da anglismoj ol en Francio! Tio similas al diferencoj inter la angla kiun oni parolas en Britio kaj tiu parolata en Nov-Zelando kaj Aŭstralio. Post kelkaj tagoj oni komprenos la diferencojn.

Kanado havas du oficialajn lingvojn —

anglan kaj francan — sed la franca estas la sola oficiala lingvo je provinca nivelo en Kebekio. Oni parolas la anglan kiel ĉefan lingvon preskaŭ ĉie en Kanado, sed en Kebekio denaskaj anglalingvanoj konsistigas nur 8% de la loĝantaro kaj tiu procento lastatempe plimalgrandiĝas. Anglalingvanoj emas forlasi Kebekion por iri al aliaj kanadaj provincoj.

Dum multegaj jaroj, franclingvanoj kredis ke la franca lingvo estas en danĝero. Anglalingvanoj kaj la angla lingvo ĉefrolis en Kebekio. Tamen, dum la tiel nomita “trankvila revolucio” ekde la 1960-aj jaroj, franclingvanoj komencis peti pli da apartaj rajtoj por sia societo, pli vastan uzon kaj protekton por la franca lingvo, kaj eĉ sendependecon. Kelkaj kebekianoj ne plu



Ichigo121212, Pixabay

volis aparteni al la ĉefe anglalingva Kanado. Okazis du referendumoj: 59,6% kontraŭ 40,4% el la voĉdonantoj kontraŭis la sendependecon en 1980, kaj 50,6% kontraŭ 49,4% kontraŭis ĝin en 1995: Kebekio preskaŭ sukcesis sendependiĝi!

Laŭ popolnombroj, la nombro de francparolantoj en Kebekio kreskas, kaj 95% de la loĝantaro scipovas la francan. Eĉ duono de la provinca loĝantaro scipovas nur la francan. Imagu: ili loĝas en plejparte anglalingva kontinento sed, je pli ol 250 jaroj post kiam Francio perdis sian nordamerikan teritorion, ili ne parolas la anglan. Ili povas fari ĉion en la franca lingvo. Iliaj infanoj edukiĝas franclingve (fakte, edukado en franclingva lernejo estas

deviga por preskaŭ ĉiuj en Kebekio) kaj eĉ je universitata nivelo; ili povas rigardi la televidon aŭ legi la tagĵurnalon en la franca; kaj ili povas aĉeti en butikoj kaj peri kun registaraj instancoj en la franca lingvo.

Eĉ pli bona novaĵo por la franca lingvo: antaŭe eksterlandaj enmigrintoj al Kebekio kun alia gepatra lingvo preferis uzi la anglan, sed ŝajnas ke tiu situacio ŝanĝiĝas ĉar nun malpli da tiuj enmigrintoj emas adopti la anglan kiel sian ĉiutagan lingvon.

Plej interese, en Kanado estas multaj alilingvanoj kies gepatra lingvo estas nek la franca nek la angla nek indiĝena lingvo. Ili konsistigis kvinonon de la tutlanda loĝantaro en 2016. Do, Kanado estas vere multlingva lando.

Kelkaj anoncoj kaj sciigoj

AEA-aj ekzamenoj

2019 estis magra jaro, se temas pri ekzamenoj faritaj de homoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Tamen ni gratulu **Esther Parris**, kiu sukcesis ĉe la elementa ekzameno.

Apenaŭ estas pli efika maniero plibonigi vian lingvokonon ol fari ekzamenon. Se vi tion deziras, skribu al:

trevor.steele99@gmail.com

Trevor Steele

AEA-a arkivo en Esperanto-domo

Okazos gruplaboro en Esperanto-domo pri la AEA-a arkivo inter la 14-a kaj 16-a de Aprilo 2020. Se vi deziras helpi aŭ partopreni, bonvole kontaktu al Jonathan Cooper:

drdada@gmail.com

Fotoj el la AEA-a arkivo en la Decembra 2019 ESK

Sur paĝoj 10 kaj 11 de la decembra 2019 ESK estis malnovaj fotoj de Esperantistoj. Do per la respondoj de Trevor Steele, Donald Rogers kaj miaj memoroj ni identigis la jenajn.

Foto 1 (de maldekstre)

Betty Cleminson • ? • Ken Linton • Eunice Graham • ? • Majo Issobe

Foto 2

Supre: ? • Gerald Tummin • ? • ? • ? • Herbert Koppel • ? • ? • Isabel Gale • ? • ? • ? • ? • Ivy Fallu. Malsupre: Ruth Tummin • Svetislav Kanački • ? • Jack Fallu

Foto 3

Vera Payne kaj Tim Einihovici

Foto 4

Trevor Steele

Foto 5

Clarence Strochnetter puŝata de Tom Elliott

Estas ĉiam io nova

Mark Hamme
(Viskonsino, Usono)

Tiuj vortoj estas artikola titolo de William Ruh, verkisto por *American Stamp Dealer & Collector* (Usona Poŝtmarka Distribuantoj kaj Kolektantoj): fama, prestiĝa kaj kosta filatela revuo. La longa artikolo de Ruh estas pri Esperanto kaj Esperanto-kolektaĵoj — 7 plenaj paĝoj kun 18 koloraj ilustraĵoj. Pli surprize, la revukovrilo estas nenio pli ol kopio de la anonco pri la naŭa Universala Kongreso de Esperanto, kiu enhavas desegnon de junulo portanta terglobojn kun verda stelo inter la landoj kaj la vorto “Esperanto.”

Kiel la Verda Lupeo, tiu revuo ĉiam elstarigas poŝtmarkojn kaj poŝtmarkajn kovertojn. La artikolo de Ruha parolas unue pri “La Historio de Esperanto” (skibita tiel) kaj defendas la internacian lingvon kontraŭ Ido kaj ĉiuj aliaj mortantaj absurdaj. Elstaras frua ekzemplo de Esperanta glumarko sur poŝtkarto kaj kovertoj, kiuj surhavas la rusan Esperantajn poŝtmarkojn, inkluzive poŝtkartojn kun langetoj, kiujn la Danciga (Danzig) Esperanto-Asocio al-fiksis. Tiuj ebligis la sendantojn meti la kartojn en tajpmaŝinojn. La Danciga poŝtisto, kurioze, uzadis rememorigan poŝtmarkon pri la Universala Kongreso de Esperanto de 1927. Tiujare Rusujo faris alian Esperanto-poŝtmarkon elstarigante Zamenhof-on, kaj uzantaj rusujajn glumarkojn. La elstarata poŝt-

karto estas anonco pri Esperanto, kaj la sendinto skribis legeblan Esperantan mesaĝon pri la kunveno.

Sur la sekva paĝo estas aliaj ekzemploj de Esperanto-kovertoj kaj presaĵoj. Estas ankaŭ unuataga koverto de aŭstralia poŝtmarko pri Esperanto de la jaro 1949. La lasta paĝo havas fotojn de jugoslava poŝtkarto rememoriganta pri la 38-a Universala Kongreso kaj la poŝtkarto surhavas poŝtmarkon kun la foto de Zamenhof. Tiu kreigis en Rusujo en 1987. La mesaĝo sur la jugoslava poŝtkarto estas legebla, kaj temas pri la kunveno.

La gazeto elstarigante tiun artikolon estas No. 137, t.e. Novembro-December de 2019. Eble per americanstampdealer.com vi povos vidi aŭ akiri ekzempleron de la artikolo. Mi jam dankis la redaktoron pro la artikolo, kaj mi informis lin pri la Esperanto-filatelistoj kaj Esperanto kolektantoj, ELF-AREK, kiun mi partoprenas. Al ELF-AREK kaj la usona kaj aŭstralia gazetoj mi sendas mian raporton kune kun miaj elkoraj salutoj. Ĉiam bonvenas leteroj kaj poŝtmarkoj!

Mark Hamme
C/- Franklin Hamme,
1831 Happy Hollow Road,
Petersburg WN 26847, USA



Helen Keller (1880–1968)

Lumo en Mallumo

Trevor Steele (Adelajdo)

Imagu, ke subite vi estas tute blinda – vi vivas en eterna nokto. Terure, ĉu ne? Imagu ke krom tio vi perdas vian aŭdkapablon; vi estas fortranĉita de la mondo per muro de silento. Kaj subite vi ne plu povas paroli, vi estas muta, vi ne povas komuniki kun aliaj homoj.

Kiam Helen Keller estis deknaŭmonata, infekta malsano igis ŝin blinda, surda, kaj muta. Kvankam oni kredis ŝin idiota, ŝi estis baze inteligenta eta homo, kaj tio pliiĝis ŝian senton de frustriĝo. Helen estis kvazaŭ sovaĝa eta besto, ribelema, neregebla. Kaj tiel estis ĝis ŝi estis ses jaraĝa.

Alexander Graham Bell, la fama inventisto, estis ankaŭ granda helpanto al surduloj. Li rekomendis al la familio Keller, ke ili kontaktu s-ron Anagnos, la direktoron de lernejo por blinduloj. Anagnos konsilis, ke oni uzu la talenton de Anne Mansfield Sullivan, parte blinda dudekjara fraŭlino kun granda pacienco kaj komprenemo. Tiu pacienco tre necesis, sed fine estis trarompo: Helen kaj "Instruistino" evoluigis sistemon de komunikado per tuŝoj sur la manoj. Dumvive Helen sentos grandan dankemon. Ŝi skribis en sia aŭtobiografio: *Ĉio plej bona en mi venis de Instruistino. En mi estas nek talento, nek aspiro, nek ĝojo, kiu ne estis unue vekita de ŝia ama tuŝo.*

Dank' al sia denaska inteligento kaj apenaŭ kredebla sindediĉo Helen lernis legi, skribi, tajpi, eĉ paroli. Ŝi diplomiĝis kun tre bonaj notoj de Radcliffe College kaj poste fariĝis tre fekunda verkistino, prelegistino, kaj aktivistino por inaj rajtoj kaj por ĉiuspecaj handikapuloj. Ŝi ricevis tiom da honoraj premioj, ke ili plenigas tutan ĉambron en la domo de

la Usona Fondaĵo por Blinduloj. Ŝi vojaĝis al multaj landoj, inkluzive Aŭstralion en 1948.

Mark Twain skribis: *La du plej elstaraj personoj de la moderna epoko estis Napoleono Bonaparto kaj Helen Keller. Napoleono provis per armeo venki la mondon kaj malsukcesis; Helen Keller provis venki la mondon per mensopovo – kaj sukcesis.*

En la libro *Mia religio* Helen atribuis sian vivoĝojon al konatiĝo kun la ideoj de Emanuel Swedenborg, sciencisto, filozofo, kaj teologo de la 18-a jarcento. Swedenborg skribis, ke fido kaj amo elradias de interne; vid- kaj aŭdpovo estas ne nepre necesaj por realigo de la celoj de homa vivo. Tiu konvinkiĝo ebligis, ke Helen vivu laŭ la moto: *Dum oni diris, ke io ne eblas, ĝi estis farita.*

Ŝi bele esprimis sian fidon en *Mia religio*:

Dum mi vagas tra mallumo, renkontante malfacilaĵojn, mi konscias pri kuraĝigaj voĉoj murmurantaj al mi el la spirita mondo. Mi perceptas sanktan pasion, kiu subenverŝiĝas el la fontoj de la Senfino. Mi jubilas pri muziko pulsanta laŭ la ritmo de Dio. Ligite al sunoj kaj planedoj per nevideblaj ŝnuroj, mi sentas la flamon de eterneco en mia animo. Tie ĉi, meze de ĉiutaga aero, mi sentas la impulson de eteraj pluvoj. Mi konscias pri la gloro, kiu ligas ĉion surteran al ĉio ĉiela, en kadro de silento kaj mallumo. Mi posedas lumon, kiu donos al mi vidon miloble pli fortan, kiam la morto liberigos min ... Unu aferon mi scias, ke iam mi estis blinda, sed nun mi vidas.

Historia germana influo en Afriko

Arkitekturo kaj lingvo

David Ryan (Wellington)

Dum la 19-a jarcento diversaj eŭropaj landoj konkuris por starigi koloniojn tra Afriko. Temis ĉefe pri Francio kaj Anglio, sed ankaŭ aliaj landoj kiel Portugalio, Hispanio, Belgio, Italio, kaj Germanio.

Namibio estas la norda najbaro de Sud-Afriko en la okcidenta marbordo. Namibio estas sufiĉe granda lando, sed la loĝantaro estas malgranda, malpli ol 3 milionoj. Pro tio, Namibio estas relative nekonata lando. Oni faris la plej lastan filmon de *Mad Max* en la namibia dezerto.

En 1882 venis Germanoj al tiu parto

de Afriko kaj "Germana Sudokcidenta Afriko" iĝis kolonio de Germanio. Poste, dum la unua mondmilito, Sud-Afriko okupis la landon kaj administris tie ĝis 1990 kiam Namibio iĝis sendependa lando.

Tamen, pro la iama ĉeesto de Germanoj en Namibio, oni vidas ĉie ankoraŭ sufiĉe evidentan germanan influon. Urbeto en la okcidenta marbordo estas Swakopmund, plejparte turisma/feria loko. Ni vizitis tie en decembro 2019 kaj trovis multajn belajn ekzemplojn de germana arkitekturo.

Pri la lingva situacio en Namibio: ĝis



Altes Amtsgericht (malnova distrikta kortumo) en Swakopmund, Namibio. Konstruado komenciĝis en 1906 kiel lernejo, sed pro financaj problemoj ĝi fariĝis juĝejo en 1908, poste gastejo, kaj en 1976 (post renovigo) municipa administrejo. La arkitekto estis Otto Ertl, kiu kreis multajn aliajn ĉirkaŭe. (Foto: David Ryan)

sendependiĝo en 1990, la angla, germana, kaj afrikansa estis oficialaj lingvoj. Tamen, en 1990 la nova registaro elektis la anglan kiel oficialan lingvon, sed ŝajnas ke ĝi estas nur la ĉefa administra/komerca lingvo. Nur 3% de Namibianoj parolas la anglan hejme. Fakte, mi legis ke oni plendas ke eĉ "instruistoj" de la angla en lernejoj ne bone parolas la anglan! Pro multaj indiĝenaj lingvoj parolataj en diversaj regionoj, necesas interkonecta lingvo ("lingua franca"), kaj la afrikansa havas tiun rolon (kun la angla dualoke). Oni eĉ diras ke la afrikansa estas la neoficiala oficiala lingvo de Namibio. Plejmultaj blankuloj en Namibio parolas la afrikansan (60%), germanan (32%), kaj anglan (7%) laŭ la popolnombrado de 2011.

Nuntempe estas tagĵurnaloj en la angla, afrikansa, kaj germana, kaj en Swakopmund ni vidis multajn afiŝojn/indikilojn en la angla, afrikansa, germana, kaj loka indiĝena lingvo. La germana lingvo ankaŭ gravas pro la fakto ke multaj Germanoj vizitas Namibion. Germanio estas la ĉefa eŭropa lando el kiu iras turistoj al Namibio kaj estas rektaj flugoj de Frankfurt al la ĉefurbo, Windhoek. En Swakopmund ni vizitis germanlingvan librovendejon kaj ni manĝis en germana restoracio. Niaj kelnerinoj estis germanlingvanoj kaj ŝajnas ke la plej multaj klientoj parolis la germanan.

Mi rekomendas Namibion se vi volas viziti Afrikon. Namibio estas trankvila, varma, kaj malmultekosta lando.



Hohenzollernhaus, frua hotelo (1904–6) en novbaroka stilo en Swakopmund, Namibio. Post renovigo en 1988 ĝi fariĝis apartamentaro. (Foto: David Ryan)

Kelkaj pensoj pri George Orwell kaj Esperanto

Trevor Steele (Adelajdo)

Unu el la internacie plej konataj verkistoj estas la anglo George Orwell (1903–1950). Lia plej fama verko estas la timiga malutopio 1984. Por Orwell lingvo estis politike ege grava (oni legu lian eseon “Politics and the English Language”). Ĉar tre grave rolas en 1984 la manipulata lingvo “Newspeak” (Novparol), Orwell eĉ verkis apendicon pri la strukturo de tiu lingvaĉo trudata al la loĝantaro por limigi la kapablon pensi alimaniere, ol deziras la tirana registaro. Ŝajnas al mi, ke en tiu prezento de la lingvo ke Orwell parodias Esperanton.

Orwell probable havis tre supraĵan konon de Esperanto, sed li certe konis kaj malŝatis almenaŭ unu esperantiston: Lanti.

Eugène Adam, konata inter esperantistoj kiel la homo daŭre kontraŭ (anti) burĝa socio (la anti → Lanti), estis sia-speca viziulo, kiu fondis SAT, Senaciecan Asocion Tutmondan. Li strebis estigi mondon sen naciaj limoj kaj kun unu liga lingvo por la tutmonda proletaro.

Lanti havis vivkunulino en Parizo, kiun li poste edzinigis, sed forlasis post kelkaj jaroj. Evidente la rilatoj inter li kaj Ellen Kate Limouzin estis foje streĉaj.

George Orwell estis nevo de Ellen, ĉe kiu li loĝis en Parizo, kaj pere de ŝi li renkontis Lanti. La du fortkarakteraj kaj polemikemaj viroj estis reciproke antipatiaj. Mi kredas, ke tio donis al Orwell

negativan impreson pri Esperanto.

Estas ja kelkaj ŝajnaj similaĵoj en Esperanto kaj la malbela Novparol. Ambaŭ havas relative limigitan vortstokon, sed pro malaj kialoj. La celo de Novparol estas daŭre forigi el la riĉa angla lingvo “nedeziratajn” vortojn kaj redukti ĝin al papaga ĵargono. La celo de Zamenhof estis tute alia: li volis, ke lia lingvo servu al sciencistoj, poetoj, komercistoj, politikistoj, ktp. Alivorte, li bezonis vastan vortstokon. Sed li krome

volis, ke ankaŭ analfabetoj kaj homoj ekster la eŭropa lingvosfero facile mastru la lingvon. Kiel kombini la du postulojn? Lia genia solvo estis komenci per relative malgranda radikaro kaj pere de afiksoj tamen ebligi lingvon kun enorma vortstoko.

Sendube Orwell sciis, ke Esperanto abunde uzas *mal-*. En Novparol okazas io simila: bona

estas *good*, kaj malbona estas *ungood*. Alia ŝajna similaĵo: en Novparol oni kreas tre longajn (kaj intence malbelajn) vortojn per kombino de diversaj elementoj. En Esperanto oni trovas tiajn vortojn, kiaj *malsanulejo* kaj *ekslern-ejestrino*.

Probable klera leganto, kiu svage scias, ke Esperanto ekzistas, sed tute ne konas la lingvon, ricevus dank’ al Orwell tre negativan ideon pri la internacia lingvo. Kaj tiu, mi kredas, George intencis. Ĉu malfrua venĝo pro la maniero, en kiu Lanti traktis lian onklino?



Lanti en ĉ. 1910: ĉu kverelo estis inspiro de Novparol?

Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Kongreso kaj Somerkursaro

Aŭklando, Nov-Zelando
10–19 januaro 2020

La Kongreso kaj somerkursaro 2020 okazis ĉe St Francis Retreat Centre, 50 Hillsborough Road, Mt Roskill, Aŭklando, Nov-Zelando.

Niaj specialaj gastoj estis **Duncan Charters**, la nova prezidanto de UEA, kaj **Stefan MacGill**, fama verkisto kaj eks-vicprezidanto de UEA (2013–2019).

Inter la programoj estis ludvespero, tutaĝa ekskurso al belaj naturaj lokoj proksime al la urbo, gvidata vizito al Aŭklanda Art-Galerio, kaj seminario por "Aktivula Maturigo" (AMO), kiu temis pri trejnado por altigi kapablojn de niaj aktivuloj. Malsupre vi trovos diversajn fotojn kaj komentojn de partoprenintoj.





Ĉi tiu paĝo, supre: Lion Rock, Puha Beach (Jonathan Cooper). *Malsupre:* Ludvespero; unua premio en la Kongresa Foto-konkurso kaj la Popola Elektio (Helen Palmer).


Kontraŭa paĝo, supre maldekstre: Donald kaj Bradley (Helen Palmer). *Supre dekstre:* Vicky prezentas sian porinfanan bitlibron "ABC ĝis ŬZ" (Jonathan Cooper). *Malsupre:* Emma Breuninger prelegas pri "Vivo de 'Germanaj Specialistoj' en Sovetunio en la jaroj 1946 ĝis 1958" (Jonathan Cooper).





La kursloko estis tre bona,
la manĝaĵo sufiĉe agrabla
kaj la programo interesa.

*La belvidejo de Arataki
(Fotoj: Jonathan Cooper)*



Mi ŝatis la kurson, ĉar ĝi estis
tre interesa. Mi ŝatis lerni gram-
atikon. Mi iros hejmen kaj prov-
os memori legi Esperanton ĉiun
tagon. Estis bona sperto ren-
konti kelkajn famajn personojn.



Kara instruistino Lee,
Multajn dankojn al vi. Vi laboris
diligente kaj pacience per multaj
variaj manieroj. Mi ricevis multe.
Mi ne trovis malbonajn punktojn.

*Kam Lee fotas okazaĵojn
(Fotoj: David Ryan, Jonathan Cooper)*

- (1) Loko tre agrabla
- (2) Manĝaĵo bona, diversa
- (3) Banĉambroj sufiĉaj
- (4) Kie estas la forktoj
- (5) Frato Filipo tre helpema
- (6) Duona ekskurso
- (7) Homoj ĉe la flughaveno
por renkonti nin?
- (8) Kiam okazos la venonta
evento ĉi-tie?



Viaj Komentoj!

La duanivela klaso de Stefan McGill estis tre ĝuinda, informa kaj valora. Per sperta kaj bonega instru-metodo Stefan montris al ni tiujn, kiuj estos neforgeseblaj memoroj.

Ankaŭ la ekskurso al la arta muzeo kun la gvidado de Jonathan estis tre informa kaj plezura.

Elkoran dankon por la organizado de tiu somerkursaro.

Charters ege interesa kaj li estas spertulo pri la lingvo kaj la temoj. Ni estis ege bonŝancaj havi lin inter ni. Ĉiu estis bonhumora kaj amikema. La etoso ĉiam estis bonveniga.

Mi ŝategis la kurson kaj kongreson. Finfine la oportuno uzi Esperanton kun pli lertaj kaj pli spertaj esperantistoj. Dankon! Mi lernis multe en la klaso por progresantoj, precipe ĉar Stefan parolis pri vasta vario de temoj, kaj li estas agrabla kaj sperta instruisto.

Mi estas tre kontenta pri la kongreso. La ejo estas preskaŭ ideala, laŭ mi. La ĉambro estis komforta, banĉambro agrabla, manĝaĵo bongusta kaj sufiĉa. La ĝardeno kaj konstruaĵo belas.

La ekskursoj estis ĝuataj. Jonathan bone gvidis en la art-galerio. Mi aparte ŝatis la prezentaĵojn de la junuloj, kiuj estis viglaj, informplenaj kaj bone instruitaj.

Mi tre ŝatis ĉi tiun kongreson. La manĝoj estis bonaj. La prezentaĵoj estis bonaj. La loko, la domoj kaj la ĉirkaŭa kamparo estis bonaj. Mi tre ĝuis komuniki kun multaj aliaj personoj, kiuj tiel bone regis la lingvon. Mi ne povas trovi unu punkton, kiun mi ne ŝatis. Mi antaŭguas la venontan kongreson, en kiu mi povas partopreni.

La manĝaĵo estis monotona, bona sed ne bonega. La supoj estis ĉiam same spicitaj. Mi ŝatas ovojn/omleton por la matenmanĝo. Vespere estis ĉiam la samaj legomoj kaj dolĉaĵoj: malfalicas por homoj, kiuj volas eviti troan sukeron, glutenon ktp. La sendrata reto estis tro malforta en mia ĉambro, nur 30%, kelkfoje eĉ ne funkciis. La ĉirkaŭaĵo estas bona, sed butikoj estas tre for.



Malantaŭa vico: 1. Paŭlo Garwood 2. Helen Palmer 3. Georgia Naish 4. Cecily Lee 5. Vicki Meza
Meza vico: 1. Martin Purdy 2. Don Rogers 3. Vere Williams 4. Penny Vos 5. Ivan Pivac 6. David
 12. Paul Desailly 13. Cindy Lu 14. Stephen Pitney 15. Marie Elliott (Mara Molnja) **Antaŭa vico:**
 6. Bradley McDonald 7. Jonathan Cooper 8. Heather Heldzingen 9. Duncan Charters 10. Stef



Fotisto: Kam Lee

ky Crickett 6. Rouan Van Ryn 7. Franciska Toubale 8. Emma Breuninger 9. Chris Krageloh
 d Dewar 7. Karlo Egger 8. Berni Heinze 9. Michael Carney 10. Erin McGifford 11. Eileen Jones
 vico: 1. Kam Lee 2. Ellen Thackray 3. David Ryan 4. Indrani Beharry-Lall 5. Sandor Horvath
 an MacGill 11. Zhang Wei (Wayne) **Mankas en foto:** John Hyndman, Marumi Smith, Gary Smith.

...Kaj pli...

La Esperanto-kongreso estis tre bone organizita. Mi nur povas laŭdi la organizantojn pri tio. Daŭrigu tiumaniere.

Bela ĉirkaŭaĵo kaj komforta loĝejo. Manĝaĵo ofte bona, sed ne ĉiam. Kunvenoj taŭgaj por la uzado. Bone, ke ni havis la eblecon uzi la lavmaŝinon. Programo plejparte interesa.

Mi tre ŝatis la kurson, la kunvenojn kaj la homojn. Mi lernis tre multe, eble pli multe ol mi pensis ebla. Dum la kurso, unuafoje, mi ekpensis en Esperanto per sonĝo en la lingvo mem.

Ankaŭ mi ĝuis provi publikan paroladon, ĉar mi kutime ne faras tion, kaj certe mi ne ofte ŝatas fari ĝin. En Aŭklando ni ne tre ofte spertas, ke homoj amasiĝas en tia nombro. (Ne pli ol dek).

Kongresejo: ĉio en unu loko. Komfortaj ĉambroj, bongusta manĝaĵo, bela ĉirkaŭaĵo.

Por mi ĝi estis la unua (du-)landa kongreso SEN Germanoj. Mi ŝategis la tre familian kaj tute NE-komplikan etoson.

Kursoj, prelegoj de Duncan brilaj kaj interesaj. Ankaŭ prelegoj kaj kontribuoj de la aliaj personoj estis interesaj.

Bela tuttaga ekskurso en la naturo. Program-ŝanĝoj spontanaj kaj ne komplikaj tute ne ĝenis kaj la rezultoj ĉiam estis bonaj.

Mi jam pensas pri eventuala denova partopreno en via kongreso post kelkaj jaroj. Dankon al vi ĉiuj.

(1) Perfekta kongresejo – malmultekosta loĝado, bonegaj manĝoj, puraj banĉambroj, bone ekipitaj kun celo de privateco.

(2) Ĉambroj kaj seĝoj adekvataj al la celoj, kun bona akustiko, projekciilo, laŭtparolilo.

(3) Kursoj je tri niveloj por kontentigi la diversajn bezonojn kun adekvataj instruistoj kaj utiloj, interesaj instrutejoj kaj ekzercado.

(4) Bela etoso de amikiĝo, amikeco, kunlaboro.

(5) Atentu al pliaktivigo por Esperanto-kuraĝigo.

Manĝaĵo estis bona, fakte tro bona. Mi lernis multe pro la prelegoj de Duncan Charters, kiu persvadis min fari multon en la estonteco pri la Esperanto-movado. Bedaŭrinde mi ankaŭ konscias – hejmenirante – pro granda manko da tempo, plej eble mi ne atingos/faros tiujn celojn. Estis multe da informo pri kiel pli bone uzi komputilon por Esperanto. Tamen mi ne komprenis ĝin pro mia manko de komputila scio. Mi ŝatus havi pli da amuzaĵoj, kiel kantado, montrado de maoria kulturo, la "haka", ktp. Laŭ mi tio mankis en la "amuza" programo.

Bone, ke Duncan kuraĝigis homojn prezenti ion en la klaso. Tio bone funkciis por la nekutimaj Esperanto-parolantoj ankaŭ prezenti sin.

La ekskurso al la artgalerio ne tiel ekscitis min. Mi ne kulpigas Jonathan. Li ĉiam bone kondukis, sed pli simple estus trairi parkon St. Cecilia kaj viziti la Pah Homestead kun pentraĵoj, skulptaĵoj, kunmetaĵoj ktp, senpage!

La ludoj multe helpis faciligi la lernadon de Esperanto. Se estus pli da ludoj en lecionoj, mi pensas, ke tio plibonigus la kurson.

Mankis muzika evento, iom bedaŭrinde, sed eble venontfoje tio eblos.



Supre: Kam Lee kuŝas por ripozi. (Foto: Sandor Horvath)
Dekstre: Indrani purigas siajn ŝuojn por protekti kaŭriajn pinojn kontraŭ mikroorganismoj antaŭ piedirado trans Mercer Loop (Foto: Jonathan Cooper)



Supre: Sandor Horvath en Aŭklanda Art-Galerio.
Dekstre: Samloke, Jonathan eksplikas komponadon per rubaĵo. (Fotoj: Helen Palmer)

Ĝis revido!

La Fluganta Elefanto kaj la Supera Fortikaĵo

J. Marc Schmidt

Inter novembro 1944 kaj aprilo 1945 la japana militistaro lanĉis 9 300 sen-pilotajn balon-bombojn kontraŭ kontinenta Usono. Havante nek gvidilon nek propulsilon, la balonoj ŝvebis silente trans la norda Pacifika Oceano dum ĉirkaŭ 2–4 tagoj, 10km alte. La balonoj puŝiĝis al sia celo per la ŝprucfluo¹, kiu estas sezona, rapidega orienta vento, kvazaŭ rivero de aero.

La ŝprucfluo malkovris Wasaburo Oishi, meteorologiisto kaj Esperantisto; fakte prezidanto de la Japana Esperanto-Instituto de 1930 ĝis 1945. Li eldonis sian esploron pri la ŝprucfluo Esperante, por pli bone disigi ĝin inter-nacie. Tamen la rezulto estis la malo.

Lia esploro estis preskaŭ nesciata ekster Japanujo.

La nomo de la milita kampanjo estis Operaco Fluganta Elefanto. Ties ĉefa kialo estis venĝo.

La 7-an de decembro 1941, la japana marmilitistaro sturmis Pearl-Havenon per la "1-a Aera Floto", granda floto de aviadilŝipoj, aviadiloj, kaj subtenantaj ŝipoj. Ŝokitaj kaj humiligitaj, la usonanoj deziris venĝon, sed ne posedis bonan armilon por efike ataki la ĉefajn insulojn de Japanujo. Tial ili faris aŭdacan planon. La aviadilŝipo *Hornet* ŝipis proksime ĉe la orienta marbordo de Japanujo. Sur ĝi estis dekseco da B-25aj bomb-aviadiloj. Oni ne dezajnis tiun grandan



Fluganta *fu-go* super neĝa monto, en eksperimento post la milito. (Usona Aerarmeo, antaŭ februaro 1946.)

aviadilon por ekflugi de aviadilŝipo; nur tre lerta piloto povus fari tion. Resurŝipiĝi per B-25a aviadilo estis certe neeble. Tial post kiam la B-25aj aviadiloj faligis siajn bombojn super Japanujo, ili daŭrigis flugon al Ĉinujo. Jen la *Doolittle Raid*, de la 18-a de aprilo 1942.

La damaĝo de la bombardo estis bagatela. Plie, ĉiu aviadilo perdiĝis. 15 el tiuj surteriĝis frakase en Ĉinujo, kie kelkaj el la flugantaro estis kaptitaj. La 16-a aviadilo surteriĝis en Vladivostoko; la flugantaro estis tenita kaj la aviadilo konfiskita. La celo estis ĉefe skui kaj hontigi la japananojn. Ĝis la *Doolittle Raid*, Japanujo gajnis venkon post venko en la Pacifika Milito. Sed nun, la imperia urbo Tokio bombiĝis, kaj l' Imperiestro estis minacata.

Venĝo estis la rimedo. Bombardo kontraŭ kontinenta Usono devos okazi.

La 1-a Aera Floto ne plu povis fari tion. Kvar el ties aviadilŝipoj estis enprofundigitaj dum la Batalo de Midway ("Vojmezo") inter la 4-a-7-a de junio 1942. La eblo de la japana marmilitistaro etendi sian povon ege malgrandiĝis. Alia elekto bezoniĝis.

Do la papera balon-bombo. Per balonoj de facila vento, nun de loko flugu ĝi al loko. Du jaroj da esplorado, testado kaj konstruado fare de pli ol miliono da homoj necesis por fari tiun venĝarmilon. Oishi, 68-jaraĝa en 1942, ŝajne ne mem partoprenis. Ni nur povas scivoli, ĉu li iam diskutis pri la projekto kun samideanoj en ĉiumonataj kunsidoj.

La balono nomiĝis *fu-go*. La vorto *go* signifas "numero", kaj la vorto *fu* signifas 32. Tiu senco devenas el antikva japana poezio, *I-ro-ha*, kiu utiligas ĉiun silabon de la japana lingvo unufoje. Oni tial povas uzi la poezion por ordigi aŭ nombri aferojn, ekz. disvolvigataj specialaj armiloj. Tiel *i-go* signifas "N-ro 1", *ro-go* "N-ro 2", ktp. *Fu-go* signifas "(speciala armilo) N-ro 32".²

Fu-go estis 10-metra sfero farita el 600 pecoj da morusarbusta papero, *kōzogami*. La paperaj pecoj estis laminigitaj kaj gluigitaj per pasto, kiun

oni faris el *konnyaku*.⁴ *Konnyaku* estas speco de ignamo, populara kiel manĝaĵo en Japanujo. La gluadklopodo postulis la tutan rikolton de tiuj ignamoj.

Miloj da mezlernejaj junulinoj laboris pri tiu gluado, anstataŭ lerni. Unu eksjunulino memoris la travivaĵon. La junulinoj ne portis ŝuojn por ne damaĝi la paperon hazarde. La fabriko dike kurteniĝis, por ŝirmi sin kontraŭ bombardo. Do la interno de la fabriko estis malhela. La junulinoj laboris dum 12-horoj en la humida fabriko antaŭ ol reveni hejmen, kungluitaj per ignamogluo. Ne estis paŭzo por tagmanĝo, kaj estis nur eta vespermanĝo: du rizpilkoj, malofte



Fu-go replenigita por fotado ĉe Moffett Field, Kalifornio. (Usona Armeo, januaro 1945.)

legomoj, kaj misoa supo. Pro malsato, la knabinoj fojfoje sekrete manĝis la igitamopolvon, el kiu la gluo estis farita. La knabinoj portis kapobendojn sur kiu estis la frazo, "Speciala Atak-Armeo de Lernantoj."

Por testi la partojn en malvarmega vetero, la esploristoj pri la *fu-go* rekviziciis la tutan stokon da seka glacio (solida CO₂) en Tokio. Nokte, 10km alte, la temperaturo povas atingi -50°C.

Ĉiu balono kostis ĉirkaŭ US\$2 000 laŭ 1945-mono. Lanĉado de unu balono bezonis 30-60 minutojn, skipon de 30 homoj, kaj senventan veteron.

La unua balono lanĉiĝis la 3-an de novembro 1944, je la 5-a horo matene. Aspektante kiel granda meduzo, ĝi leviĝis preskaŭ silente, escepte de eta susurado de la papero.

"Ĝi ne ŝajnis reala," diris unu teknikisto, pri la lanĉo de la balonoj. "Ni ĉiuj estis silentaj dum laboro, kaj poste ni paŝis malantaŭen, kaj spektis. Nek estis aklamo, nek manifestacio. Oni sentis ke ĝi estas sonĝo, aŭ ke fakte oni spektas la malfermon de festivalo. Oni scivolis kial la balonoj ne estas buntaj kaj trenantaj flagetojn, kial fajraĵo ne eksplodas, kaj kial mankas aklamkrianta homamaso."

La balonoj ne havis japanajn signojn aŭ ion ajn kiu montris la devenon de la balonoj, por eviti rebat-on per la B-29aj bomboj.⁵ Tamen, stranga kutimo disvolviĝis ĉe la lanĉejoj. Soldatoj fojfoje metis siajn proprajn *samhara*-ojn kaŝe en la *fu-go*, ĵus antaŭ ol ĝi iris al lanĉo. *Samhara* estas ŝinto-amuleto, donata al soldato ĵus antaŭ ol li iras al la batalejo. Li portas la amuleton kiel preĝon por protektado.

Unu balono kiu troviĝis en Alasko kaŝe enhavis poŝtkarton de infano el ele-

menta lernejo, Yoshiharu Shinada, al lia patro.

La levigilo de *fu-go* estis 300m³ da hidrogeno. Krom la bomboj, balono portis ilon por mezuri kaj regi altitudon. Se la balono ŝvebis tro alte, ĝi liberigis hidrogenon. Se tro malalte, ĝi faligis sablosakon. Tempoŝaltilo eksplodigis la bombon post tri aŭ kvar tagoj, kalkulata laŭ la rapideco de la ŝprucfluo, ĉirkaŭ 200km/h.

Vento, espero kaj konjekto ne estas maniero konduki balonon al specifa loko, ekzemple al armilo-fabriko aŭ bruligaĵo-tenejo. Tial la militaj celoj estis tri: 1) panikigi Usonanojn, 2) kaŭzi brulegojn en arbaroj, kaj tiel forturni usonan laborforton for de la milito, 3) venĝo-propagando por fortigi la kuraĝon de la japana popolo.

La militistestroj pripensis uzon de biologiaj armiloj, ekzemple bovo-malsano, por damaĝi lakto-produktadon, sed neniam faris tion. Unu nemilitistara meteorologiisto kiu laboris pri la flugantaj elefantoj, d-ro Sakuhei Fujiwara, asertis ke li rifuzos labori plue se ajna biologia armilo uziĝos. Li volis nur arbarobrulon. Kompromiso: la balonoj portis fajrigobombojn, kaj/aŭ personaromortigajn bombojn, entute inter 12-70kg. La tuta maso de balono sen bomboj estis 147kg.

La 24-an de novembro Tokio bombiĝis denove, nun de floto de 111 B-29aj bombaviadiloj kiuj ekflugis de la lastatempe konkeritaj Marianaj Insuloj. La B-29 "Superfortress" estis la plej multekosta armilo de la dua mondmilito. La kosto por planado kaj konstruado estis ĉirkaŭ US\$3 miliardoj. Ĝi povis porti 2 300kg da bomboj por alta,



Ŝarĝo de *fu-go*. Maldekstre-dekstre: Cilindraj fajrigo-bomboj, sablosakoj, bombo (sube, en ombro), kaj eksplodeta ŝtopilo por aŭtomate faligi sablosakon. Super ĉio estas la altitudo-regulilo, baterio, kaj aliaj bezonaĵoj.

longdistanca atako, kaj pli granda ŝarĝo por pli mallonga, malalta flugo.

S-ro Teiji Takada, sciencisto kiu laboris pri la balonoj, memoris: "Kiam la plan-etapo de la *fu-go* finiĝis, kaj la atako komenciĝis plene, la perforto de la bombardo kontraŭ Japanio farate de Usono pligrandiĝis. Ĉiunokte, la ĉielo estis ruĝa, reflektanta la fajregojn. Sendomigitaj homoj amasiĝis apud ni ĉiutage pli kaj pli... Tremantaj pro timo de tiuj incendioj, ni deziris rebate utiligi fajron, esperante ke ties perforto okazus en la malamika lando. Ni faris nian tutan penon por realigi nian nekonsekvencan deziron. Al tiaj kontraŭaj celoj ni puŝiĝis pro la milito!"

Inter la 9-a–10-a de marto, Tokio de-nove estis atakita de pli ol 300 B-29oj. La bombaviadiloj faligis fajrigobombojn kaj abundon da napalmo. La sturmego kaj sekvanta fajroŝtormo mortigis proksimume 90 000 homojn, kaj sendomigis proksimume 1 milionon.

Vintre, la arbaroj en nordokcidenta Usono estas malsekaj pro neĝo, pluvo kaj nebulo. Tial *fu-go* neniam kaŭzis arbarobrulegon, nur du etajn veprofajrojn.

Unu damaĝo estis mallongtempa perdo de elektro ĉe la atomenergia instalaĵo en Hanford, Kalifornio, je la 10-a de marto 1945. Tiu instalaĵo faris ma-

terialon por la atombombo "Fat Man", faligita sur Nagasakon kvin monatojn poste.

Tamen la balonoj ja timigis Usonanojn. Plejparte la balonoj ne alvenis Nordamerikon — nur 285 raportoj estis oficiale registritaj dum la milito. Oni trovis tiujn en Alasko, Kanado, mezokcidenta Usono, Teksaso, Kalifornio, Meksikio kaj kompreneble nordorienta Usono. Kun postmilitaj kaj nekonfirm-itaj raportoj, eble 350 balonoj surteriĝis en Nordameriko.

Jen tri ekzemploj de balono-raportoj dum la milito: 1) Patro kaj filo, fiŝkaptantaj en arbaro, vidis paraŝuton aŭ balonsimilan aferon ŝvebiri silente proksime, kaj tiam preter monteton. Post momento, ili aŭdis eksplodon, kaj vidis fumon. 2) Nokte, dum patrino enlitigis sian infanon, ŝi ŝokiĝis pro subita ekbrilo sekvita de laŭta krako de eksplodo en la silenta malheleco. 3) Vakeroj vidis iomete ŝveliĝan balonon implikatan en veprejo apud loko kie ili tendumis dum la antaŭa nokto. La bombo ne plu estis tie ĉar la balono pli frue faligis tion.

Post la alveno de la balonoj en Usono, la ĵurnaloj raportis pri tiuj. Tamen la usonaj militestroj rapide persvadis komunikilojn ne raporti pri la balonbomboj, por ne panikigi la loĝantaron kaj por ne doni okazon por propagando en Japanujo. Novaĵo estis la unusola maniero per kiu la Japanoj lernus pri la efiko de la balonatako. Tial d-ro Fujiwara kaj liaj kunlaborantoj ne sciis ĉu sia laborego sukcesis aŭ ne. The *New York Times* skribis en 1947, "Oni devas danki la silenton de usonanoj por la malsukceso de la malamika kampanjo."

Kien la aliaj 8 950 balonoj iris estas mistero. Ĉu dronitaj ie en la vasteco de la Pacifika Oceano? Probable. La kialo ne estas tute certa, sed ŝajne la altimetro-regilo ne funkciis sufiĉe bone. Aŭ eble Oishi kaj Fujiwara miskalkulis la rapidecon de la spruĉfluo. Pluraj balonbomboj eble ja surteriĝis en vasta, senhoma arbaro, sed restas ne trovitaj. Unu bombo troviĝis en 2014, apud



Ŝarĝo de *fu-go* en Militomuzeo, Ottawa, Kanado. La usona nomo por ĝi estas *the chandelier* ("la lustraro").



Fu-go ankoraŭ kun bomboj. Indianoj faligas arbon por akiri balonon kiu surteriĝis sen damaĝado proksime al Nixon, Nevada je la 29-a de marto, 1945. (Usona Aerarmeo, aŭgusto 1945.)

Lumby, Brita Kolumbio. La balono jam malaperis antaŭ jardekoj. Bombforigistoj de la kanada marmilitistaro eksplodigis ĝin sendanĝere.

Operaco Fluganta Elefanto ĉesis post aprilo 1945 pro tri ĉefaj kialoj. 1) B-29oj damaĝis la produktadon kaj ekspedon de hidrogeno en Japanujo. 2) Pro la komunikosilento, la estraro de Operaco Fluganta Elefanto ne havis informon pri ĉu la balonoj sukcese atakis kontinentan Usonon, aŭ eĉ atingis ĝin. 3) La ŝprucfluo malfortiĝas post marto, kiam la vetero varmiĝas. La vento estas la plej forta kaj taŭga dum la malvarmaj monatoj.

Unu malfeliĉa rezulto de la ne-publikigo de la balonoj estis la mortigo de kvin infanoj kaj kvinmonate graveda virino. Tiu grupo de loka preĝejo veturis per aŭto al la arbaro apud Bly, Oregono,

por pikniki kaj fiŝkapti. Dum la edzo de la virino malplenigis la kofrujon de la aŭto, ŝi kaj la infanoj rapide iris al la rivereto, 45 metrojn for. Ili vidis surterigitan balonon, kaj staris ĉirkaŭ ĝi. Elsie Mitchell, la virino, ekkriis, "Rigardu kion ni trovis. Ĝi aspektas kiel ia balono." Infano etendis sian brakon por preni ĝin, kaj la bombo eksplodis kun grandega krako.

Jen la solaj mortoj dum la milito pro ago de malamiko sur kontinenta Usono. Troviĝas memoraĵo ĉe la ejo de la mortoj.

(Ĉi tiu artikolo devenis de prelego kiun la aŭtoro prezentis en la Tri-Landa Kongreso en Bekasi, Indonezio, 2018.)

Finnotoj

1. Alia nomo estas "jetfluo."
2. Mi ne povas konfirmi tiun. La alia klarigo de la nomo estas de la japana nomo de la balono, *fūsen bakudan*, kun senco "balono-bombo"; kompreneble ties unua silabo estas *fu*. Ĉiuokaze, bonvolu legi la poezion *I-ro-ha* rete.
3. Iomete de la papero devenas de *Edgeworthia chrysantha* (angle, "*Oriental paper-bush*"). Luj aliaj balonoj konstruiĝis el kaŭĉukigita silko, sed ne multe.
4. Angle: *konjac*. Mi ne povis trovi la Esperantan vorton. Eble "konjakuo."
5. Luj balonoj havis malgrandan kontrolo-etikedon kun dato kaj informo pri kontrolado, sed oni ne povis scii la lanĉejon aŭ alian informon per tio. La Usonanoj provis analizi la sablon en la sablosakoj por lerni pri ties origino.

Bibliografio

Coen, Ross. *Fu-Go: The Curious History of Japan's Balloon Bomb Attack on America*, University of Nebraska Press, 2014.

Coen, Ross. "When History Has More to Say." <https://unpblog.com/2017/12/19/from-the-desk-of-ross-coen-when-history-has-more-to-say/>

The Globe and Mail. "Military unit blows WWII-era Japanese balloon bomb to 'smithereens'." <https://www.theglobeandmail.com/news/british-columbia/object-found-in-forest-may-be-second-world-war-era-japanese-balloon-bomb/article21065545/c>

Grant, R. G. "Bombing of Tokyo." <https://www.britannica.com/event/Bombing-of-Tokyo>

Hughes, Richard. *Foreign Devil: Thirty Years of Reporting in the Far East*. Century Publishing, London, 1984. (Unua eldono en 1972.)

Mikesh, Robert C. *Japan's World War II Balloon Bomb Attacks on North America*. Smithsonian Institution Press, Washington DC, 1973.

Wikipedia. Artikolo pri "Wasaburo Oishi." https://eo.wikipedia.org/wiki/Oishi_Wasaburo

Bildoj

- a. Nacia Muzeo de la Usona Marmilitistaro: 342-FH-3B23432. Publika havaĵo. <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=58359424>
- b. Usona Armeo: A-37180C. Publika havaĵo. <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=716798>
- c. Nacia Muzeo de la Usona Marmilitistaro: 342-FH-3B23428. Publika havaĵo. <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=58359439>
- d. Kanada Muzeo de Milito. https://www.warmuseum.ca/collections/artifact/1040046/?q=&page_num=1&item_num=0&media_irn=5480194&mode=artifact
- e. Nacia Muzeo de la Usona Marmilitistaro: 342-FH-3B23423. Publika havaĵo. <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=58359457>

La Granda Viktoria Biciklado

Sandor Horvath (Adelajdo)





Jam delonge mi volis bicikli kun granda homamaso. Mi memoras la reklamon pri la unua Granda Viktoria Biciklado (*Great Victorian Bike Ride*) en 1984. Ekde tiam mi preskaŭ ĉiun jaron pripensis partopreni. Finfine, post 35 jaroj, mi sukcesis lastan jaron je la fino de novembro.

La Granda Viktoria Biciklado, ofte konata kiel "La Granda Vik", estas ĉiujara, nekonkura, plene subtenata, ok-naŭ-taga, bicikla ekskurso ĉirkaŭ Viktorio organizata de "Bicycle Network."

Ĝi estas unu el la plej grandaj subtenataj biciklaj rajdoj en la mondo. Ĉi-foje la vojo iris de Robe en Sudaŭstralio ĝis Torquay en Viktorio.

Antaŭ la evento mi sciis, ke pli ol 4 000 homoj partoprenos, tamen vidi, spiri kaj sperti tiun homamason estis (alia) edifa afero.



Mi estis vere impresita pri la organizado farita de "Bicycle Network."

Simple imagu la organizado de la necesoj por 4 000 homoj. Tuj oni devas pensi pri la aŭstralia filmo *Kenny*.

Ni ne devis pensi kien iri.... Ĉe multaj gravaj vojkruciĝoj estis helpantoj, kiuj haltis aŭtomobilojn kaj direktis la biciklan fluon.

Ankaŭ la organizado de tri manĝoj por tiom da homoj! La tagmanĝo okazis ie survoje, kelkfoje simple apud la vojo.



Preskaŭ 400 volontuloj helpas ĉiun jaron pri la organizado, multaj el ili jam dum jardekoj.

Unue, mi pripensis ne porti mian propran pakajon sur mia biciklo, ne estas "vera" biciklado.... sed tre rapide mi akceptis la transportadon de niaj 20 kilogramoj per kamiono.

Notinde estas krome, ke partoprenis multaj lernantoj kun siaj instruistoj, ĉefe el Melburno, kaj kun sia belaj biciklaj T-ĉemizoj.

Laciga afero? Kompreneble... bicikli inter 60–110km ĉiun tagon ja estas lacige. Sed estis nenio alia por fari krom rajdi niajn biciklojn.... Kaj ni havis 14 horojn por kompletigi la veturadon... kaj post du tagoj mi komencis vere ĝui la ĉiutagan rutinon. Kaj la aliaj 4000 homoj faris la samon.



Manĝu, dormu, rajdu, ripetu...

Kompreneble la biciklado kostis. Mi pagis \$1 200 por la organizado, la manĝaĵoj, la vesperaj distraĵoj, la ĉiutaga transporto de niaj pakaĵoj en grandaj kamionoj, provizado de multaj servoj: kriza ĉaro (angle, "sag wagon"), muziko, filmoj dum la vespero.

Kontraŭ krompago oni povis ankaŭ elekti la "dormu-facile-eblo".... tio signifas, la volontuloj starigas kaj postuze malmuntas siajn provizitajn tendojn. Ni ne elektis tion.

Neforgesebla semajno.



Eble dum la venonta Granda Viktoria Biciklado (28 nov – 6 dec 2020), grupo da esperantistoj povus aliĝi kun nia propra bicikla T-ĉemizo? Pripensu la ideon/proponon.





Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Esther Parris | **Secretary**

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Ivan Pivac | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Treasurer/Secretary**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:

Erin McGifford, Bradley McDonald

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

Maldekstre: fajrestingisto en Aŭstralio
(freeaussiestock.com)

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1150
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@gmail.com
0800 350 781

